

Paul BERTHELOT (1881-1910) fondis revuon *Esperanto* en la jaro 1905. Dum tiu ĉi jaro li aperigis en ĝi tiun «unuan provon de vortaro pure internacia». Temas do pri la unua unulingva vortaro de esperanto. Bedaŭrinde, «pro malsaniĝo» de la aŭtoro, la vortaro haltis en la vorto *debito*.

Tiun ĉi PDF-dosieron de gazeteltondaĵoj mi kunigis el la bilddosierojn de revuo Esperanto skanitaj de Aŭstria Nacia Biblioteko.

VORTARETO ESPERANTO-ESPERANTA

AVIZO AL LEGANTO

Ni komencas hodiaŭ la publikigon de tiu unua provo de vortaro pure internacia.

Jam de longe tia verko estis postulata de la Esperantistaro kaj jam de longe ĝin komencis diversaj samideanoj. Efektive ĉar nia lingvo naskas la plej multon de siaj vortoj per logika deveniĝo el malmultaj simplaj radikoj, estas plej necesege ke la senco de tiuj ĉi estu akurate fiksita kaj ne lasata al la libera fantazio de ĉiu. Ni ne bezonas prezenti ĉi-tie la diversajn malbonojn kiujn manko de tia pralaboro alportis al nia afero: niaj revuoj estas plenaj je plendoj kaj riproĉoj je tiu temo. Ne nur ofte oni trovas tri, kvar formojn por unu senco, sed ofte ankaŭ unu radiko akceptas multajn sencojn malsimilajn laŭ la diversaj vortaroj. En la fundamenta unversala vortaro eĉ, kelkfoje la tradukoj diverslingvaj diferencas, ĉar ofte estas necese akurate transdoni en la lingvo la sencojn precizan de unu vorto de alia lingvo.

Por eviti tiun malfacilon ni kolektis ĉiujn formojn kaj sencojn kiuj ŝajnis al ni rimarkindaj el la literaturo Esperantista, kaj ilin klasigis alfabeto. El tiu vortamasego ni tiras la jenan vortareton, konsistantan nur el la radikoj la plej naskemaj de nia lingvo, t.e. tiuj el kiuj devenas la plej multegon de niaj vortoj.

Oni sendube rimarkos ke tie ĉi ne estas ĉiuj vortoj de l'*Universala Vortaro* kaj ke estas kelkaj radikoj kiujn oni ne trovas en tiu lasta. Sed, pri tiuj kiuj estas samtempe en ambaŭ verkoj, ni prekaŭ ĉiam prenis la sencojn kaj formojn donitan de D^o Zamenhof, krom, kompreneble, kiam li uzas mem aliloke alian preferindan formon. Por la aliaj vortoj, ni kredis ke ni havis rajton elekti libere inter la formoj kaj sencoj proponitaj de diversaj aŭtoroj.

Multuj plendos ke tiu vortaro estas iom-malplena. Ili ne miros plu kiam ili scios ke ni sisteme forĵetis:

1^o Vortojn pure naciajn kiel *barĉo*, *bekeŝo*, *abituriento*

solicitoro, kc., kiuj estas esperantaj nur okaze, ĉar ili ne apartenas al la mondo internacia (vidu *Lingvo Internacia*, 1984, n^o 9, M. Laignier, *Pri advokato*).

2^o Vortojn plene internaciajn pri kies senco estas neniel dubeble kaj kiuj ne naskas devenaĵojn, tiel: *lokomotivo*.

3^o Vortojn tre aparte teknikajn, por kiuj oni bezonus ega klarigo sen ĝusta rilato kun ilia graveco en komuna lingvo, tiel: *kringo* (kukarto), *krisolo* (fiziko), aŭ nomojn de tre maloftaj bestoj, kiel *zoarko*.

4^o Maloftajn vortojn kies sencojn malgraŭ ĉiuj klopodoj ni ne povis kontentige precizigi, kaj flanke de kiuj ekzistas samsencaj preferindaj radikoj.

5^o Fine, ni lasis la *landajn nomojn*, pri kiuj estis tiel disputate kaj kiujn nur la landanoj mem havas rajton fiksi.

Tiel en nia vortareto restas nur la *esenco* de la lingvo, tiujn vortojn kiujn bona esperantisto devas koni perfekte rilate la senco kaj la uzado.

* * *

Pri la difino de la senco, ni penis doni al ĝi la pli grandan amplekson, akordeblan kun la precizeco. Sed tio ne estis ĉiam facile. Pri la *verboj*, nome, kio estis pli disputate ol ilia signifo? En iu vortaro tiu verbo estas aktiva, en aliu neŭtra. La uzado eĉ ne informas nin en tia okazo, ĉar tre ofte oni trovas *ahuzativon sen prepozicio* post verbo neŭtra. Kiu, diros al ni, ekzemple, ĉu *timi* estas aktiva aŭ ne? (Vidu: *Lingvo Internacia*, jaroj 1903-1904, *kritiko*). En tiu ne baldaŭ finonta disputo ni ne volis preni partion. Ni nur faris la jenon por ne lasi la lernanton en dubo: kiam la formo partecipa pasiva (ATA) estas kutima de bonaj aŭtoroj, ni markis per la cifero 2 ke la verbo akceptas la 2 formojn. En mala okazo ni metis la ciferon 1. Kiam line estis plene dube ni metis simplan signon? en espero ke pli sperta solvos la demandon.

* * *

Je ĉia gramatika vorto ni penis doni klarigon, ĉu pri ĝia signifo, ĉu pri ĝia uzado. La sencoj de la signifoj precipe ni provis difini precize laŭ la plej ĝenerala uzado.

Por mallongigi ni kunigis en unu sola artikolo radikojn, kelkfoje multajn, sed evidente rilatajn al la sama prasenco, kiel: *federio*, *federacio*, *federala*, *federalismo*, *konfederio*, kc. Unuvorte nia regulo ĉefa estis ĉiam *simpligi kaj precizigi*.

* * *

Se ĝi estus perfekte farita, tia vortareto povus liberigi la esperantistojn de la neceseco, kaj ankaŭ de la danĝero de tro plenaj vortaroj naciaj, kaj permesos al ili kontentigi sin per leksikonoj por lernantoj. Efektive, nia lingvo ne estas aro de kutimaj esprimoj kiujn oni devas ĉerpi el la aŭtoroj, sed de logikaj kombinaĵoj kiujn la uzado instruas venigi de la praradikoj. Tiel, se ekzemple ni prenas pecojn de franc-latina vortarego kaj ĝin tradukos laŭvorte en esperanto, aŭ ni ricevos *La Palis' aĵojn*, aŭ malĝustajn tradukojn.

Anstataŭ tio, se la lernanto, ne paliĝante antaŭ vortarego ĉiutage kreskanta bone ellernas la justan prasencojn de la radikoj, li scios baldaŭ mem formi ĉion, kion li bezonas kaj evitos erarojn de traduko kontraŭ kiuj la plej bona vortaro neniu sukcesos ŝirmi.

* * *

Malfeliĉe, nia modesta provo estas ja malproksime de tiu dezirindaĵo. Ni esperas, ke niaj legantoj ne rifuzos helpi nin per sia scienco kaj sperto, kaj ne ŝparos al ni la konsilojn por korekti la erarojn, plenigi la mankojn, efektiviĝi ĉiam pli da simpleco kaj pli da precizeco.

PAUL BERTHELOT.

Tabelo de Mallongigoj kaj Signoj

—	ripetas la radikon aŭ la vorton pri kiu oni parolas	k ko. ktc.	kaj. kaj ceteraj, kaj tiel cetero.
=	signifas: ekzemple		kaj tiel plu.
	montras ŝanĝon de senco aŭ disigas partojn de artikolo	ktp. k; komp:	kompare malbona uzado.
*	signifas: vidu tiun vorton en alfabeto loko	mb. mez. milit.	mezuro. militarto.
adj.	adjektivo	muz.	muziko.
adv.	adverbo	prep.	prepozicio.
E. S.	Esperanta Sintakso de P. Fruictier	t.e.	tio estas.
fil.	filozofio	teol.	teologio.
fin.	financarto	v.	vidu.
g.	genaro (de arboj, bestoj kc.)	veg.	vegetaĵo.
hem.	hemio	zool.	zologio.
ins.	insekto	ktp.	

(daŭranta)

VORTARETO ESPERANTO-ESPERANTA

DE PAUL BERTHELOT.

-a alvorto, vidu: adjektivo.
A noto de muziko.
abato monaĥestro | pliofte ti-
tolo honoriga donata al ĉia
eklezio.
abelo g. de ins. (*apis*) | -ujo:
loĝejo de societo abela | -ejo:
loko kie estas abeloj | -isto:
edukisto de -oj.
abio g. de arboj (*abies*).
abismo profundegajo.
abomeni malamegi, havi inst-
inktan malemon al io.
aboni 2 aĉeti antaŭe periode
eldonatan presajon, gazeton.
aborti 2 naski antaŭ plena e-
voluigo | -igi ion: malperme-
si ke io atingos sian finan
celon | -igi: ne plene evolui |
kom: malsukcesi = frukto,
konspirado -igi.
abrikoto frukto de -arbo,
(*prunus armeniaca*).
abrotano veg. (*artemisia*
abrotanum).
abrupta kruta, vertikala.
abscesi 1 alveni al pusa stato,
maturiĝi | -ajo: pusajo.
ankaŭ: absesi, absesi.
absinto veg. (*artemisia*
absinthium).
absoluta senrilata, sendepen-
da, senlima, = homo estas
vorto -, patro vorto rilata |
povo -; rifuzi absolute.
absolvi 2 senkulpiĝi, purigi =
la juĝisto lin forlasis -ita.
abstrakta apartigita pense de
aliaj ecoj de l'objekto | -ajo:
eco tiel konsiderata = *formo*,
 koloro, kc.
absurda malprudenta.
acero g. de arboj. (*acer*).
acida pika, akragusta | -ajo: flu-
ajo - | -o: klaso da komponaĵoj

hemiaj.
Por nomi hemiajn komponaĵojn ne-
organikajn oni grupigas serie tiujn
kiuj diferencas reciproke nur per
atomoj de metalo aŭ de hidrogeno kiuj
anstataŭigas valenco por valenco.*
Ekz.: SO⁴ Na²
SO⁴ Fe
SO⁴ KH
(SO⁴)² AIK
(SO⁴)³ Al² k.t.c.
Oni donas al tia serio nomon *ge-
neran*, al kiu oni almetas nomon
adjektivan de metaloj uzataj en ĉia
komb. Tiel oni diras:
sulfato natria (natriosulfato)
• fera (fersulfato)
• kalihidra
• kalialumina
• alumina k.t.c.
La kombinaĵo el la serio, kiu enha-
vas la plej grandan nombron de at-
omoj de hidrogeno anstataŭigebaj per
metaloj valencoj estas nomata la
acido de la serio. La aliaj estas
nomataj *saloj*.
Tiel SO⁴H² sulfato hidra, estas la
acido de sulfatoj, aŭ simple *acido*
sulfata, *sulfatacido*.
Tiel ankaŭ PO³H³ fosfito hidra,
estas *acido fosfita*, *fosfitacido*. k.t.c.
-aĉ alvorto, montras difekton
fizikan = *homaĉo*, *ĉaraĉo*,
kriaĉi, *ridaĉi*, | vidu: *Fi-*
aĉeti 2 akiri pagante.
-ad alvorto; montras agon
daŭran.
-adi: post verboj esprimas daŭron
aŭ oftecon de l'ago: *kriadi*, *veniadi*;
post nomoj ŝtofaĵi aŭ radikoj kvali-
taj, ĝi signifas estadi tio aŭ tia:
estradi, *bluadi* | -ado: ago, vidu -o
adepto aniginto, instruito pri
la scienco, arto, rito, sekreto
adiaŭ forira saluto.
adjektivo speco de vortoj,
adjektivo estas alnomo, kiun oni
metas apud la nomo por ĝin spec-
igi; se la eco montrata enestas la

objekton, t.e. ĝia propra kvalito,
la - ricevas nomon *kvalitiga* kaj
finiĝon -a: verda, mia, dua, kia,
tia, alia, kc. - se la eco montrata
rezultas el eksteraj cirkonstancoj,
t.e. determinas la obj. per neprop-
raj kondiĉoj, la - ricevas nomon
determina kaj finiĝon -a: kiu, tiu,
alio, ĉiu, neniu, kc.
adjutanto help-oficiro.
administrati 2 regi, konduki afe-
ron publikan aŭ privatan |
-acio: oficejo, oficistaro, -ado
| -atoro: reganto, -anto, -isto.
admiri 2 rigardadi kun miro k.
plezuro ion, kiu ŝajnas bela
kaj granda: - naturon, pen-
traĵojn, kuragon, talenton, |
ironie: mi -as vian fripone-
con.
adopti 2 elekti por igi sia = ad-
opti iun kiel filon, kiel fraton,
- opinion, metodon.
adori 2 oferi plejaltan honora-
don | amegi.
adresi 2 sendi ion al iun = mi
-as al vi leteron, mian gra-
tulon | -o: sendo, formulo de
sendo, ofero, dediĉo; nomoj,
signoj difinantaj estejon de l'
ricevonto | -ajo: sendaĵo.
adulti 1 havi seksajn rilatojn
malgraŭ leĝo aŭ moro, pre-
cipe dum edzado | sang-o: ad.
kun parenco | -ulo, -ulino: kiu
-as | -ido: naskito per -o.
adverbo vorto, kiun oni metas
apud verbon, adjektivan aŭ
adv. por modifi ĝian sencon.
Per tiu nomo oni kunigas tri spec-
ojn da vortoj:
1* vortoj kiuj modifas predikaton de
verbo, t.e. estas vere adjektivoj kvali-
litaj de tiu predikato, kiel en: veni
trankvile, regi bonkore, kiu signi-
fas: esti «trankvila venanto», «bon-
nkora reĝo». Ili ricevas nomon:
atverboj kvalitaj kaj finatas per -e
juste, *bele*, *verde*, k.c.
2* vortoj, kiuj esprimas cirkonstan-
con de l'ago, t.e. modifas la ver-
bon mem, kiel en: veni ofte, regi
ĉiulande, kuri antaŭe, bliuigi rapi-
de, kio signifas: «esti ofte» ven-
anta, «esti ĉiulande» reĝo, «esti

antaŭe» kuranta, «igi rapide» blua.
Ili ricevas nomon *atverboj* determi-
naj kaj havas formojn diversajn:
a) tempo: iam, tiam, kiam, ĉiam,
neniam, aliam, nun, hodiaŭ, hieraŭ,
morgaŭ, baldaŭ, antaŭe, poste, ofte,
kelkfoje, antikve, k.c.
b) loko: ie, tie, kie, ĉie, ĉiuloke,
ĉialoke, nenie, aliloke, antaŭe, po-
ste, supre, ekstere, interne, k.c.
c) maniero: iel, tiel, aliel, same,
preskaŭ, kvazaŭ, jes, ja, ne, nepre,
antikve, k.c.
d) diversaj: tiam, kial, do, k.c.
3* vortoj kiuj modifas la kvanton:
multe, kelke, pli, tre, tro, des, ju,
sufiĉe, almenaŭ, tiom, kiam, k.c.
Ili ofte sin modifas reciproke: tro
multe, multe tro, k.c.
4* erare oni nomas ankaŭ - la for-
mon posedan de pronomo: *kies*,
ties, *mies*, k.c. kaj la *gerundio*.
advokato legisto al kiu oni komi-
sias aferon, proceson, k.c.
aero fluajo elasta kiu ĉirkaŭas
la teron | -umi: doni aeron =
aerumi ĉamburon, akvon | -ŝipo
aparato por veturi en -.
afabli 1 havi manierojn dolĉajn
kaj bonakceptajn = la reĝo -as
al ĉiu | -a: dolĉe kaj ĝentile.
afekti 1 sin rimarkigi per apart-
taj manieroj = paroli -e.
afero ajo, agado, okupo, proce-
so, kc. = tio estas grava -,
la -igas malbone, Esperantisto-
toj esperas sukceson por sia -
| -isto: homo al kiu oni komi-
sias aferon, proceson.
afliŝo skribaĵo liksata en publi-
ka loko por sciigi ion.
afranki 2 pagi antaŭe koston de
transporto por sendaĵo, lete-
ro, pakajo | -ite ĝis domo.
agaci 2 efiki malagrabilan im-
preson sur nervoj = acidaĵo,
ŝiro de silko -as dentojn.
agarizo g. de fungoj (*agaricus*)
agato speco de kvarco nekrista-
tala kaj diverskolora.
aganto aganto = hemia | -ofici-
sto = komerca, polica -.
agi produkti aŭ peni produkti
efikon = la volo -as sur nervoj
la varm -as sur termometro,

nitratocido -as sur kupro | -o:
ni havas ideon de la fortoj, de
la kaŭzoj, nur tial ke ni sen-
sas illan agon.
agiti 2 movi, malkvietigi = pa-
sio -as l'ian koron | -ado: mo-
vado daŭra = proforma, fe-
bra -.
aglo g. de birdoj (*aquila*).
agonii 1 mortiĝi, suferi lastan
mortbatalon.
agordi 2 aranĝi muzikilon tiel,
ke la skalo de tonoj estu ĝus-
ta mem, kaj la sama por tuta
orkestro | -ilo: sonorilo por -.
agrabli 1 plaĉi, plezurigi | -a: kiu
kaŭzas plezuron = voĉo -.
ago periodo de l'estado = li a-
tingas agon de vireco | mezuro
de l'daŭro pasinta de l'eko
ĝis nuna tempo = kian agon
li havas? dek sep jarojn; la
- de tiu templo estas nekal-
kulebla.
ajo veg. (*allium sativum*).
aja adv. generaliga = kien - li
iros, kiel - li klopodos, kiom
- da mono li elspezos, li ne
sukcesos; ĉiu - povas tion fa-
ri; kian vi volas? ian -.
-aj alvorto: montras aferon,
objekton, ŝtofon, kc.
tiu alvorto, iom malpreciza, utilas
por formi:
1* post radikoj kvalitiga, nomon de
l'objekto aŭ afero havanta tiun econ
| blankaĵo, sensencaĵo, nunajo, ĉir-
kaŭajo, infanaĵo, amikaĵo.
2* post radikoj verba, nomon de
objekto kiu necese rilatas l'agon aŭ
rezultas el tiu ĉi: fajlaĵo, pentraĵo,
hajlaĵo, trinkaĵo.
3* post nomo ŝtofa, nomon de alia
objekto, kies la unua estas funda-
mento: ovaĵo, bovaĵo, arbetoĵo.
Vidu: -o.
akacio g. de arboj (*acacia*).
akaro g. de bestoj (*acarus*).
akceli 2 plirapidigi.
akcento aliĝo de la voĉo homa
en parolado laŭ diversaj kaŭ-
zoj = tona -, naĉa -, patosa -,
la vorta - en Esp. estas ĉiam
sur la antaŭlasta vokalo.

akcepti 2 rilati kun alvenanto =
li -is min malafable, - favore
ideon, postulon.
akcidento (fil.) eco nepropa de
ajo = flavo estas - ĉe vakso.
akcio (fin.) akto, bilo, difinan-
ta la partoprenon de iu en
societo; entreprenon, kc.
akcipitro g. de birdoj (*astur*).
akcizo imposto pagata pri iaj
komercaĵoj transirantaj difi-
nitan limon | -etato: registro
de la ŝumoj pagotaj por ĉia
komerco transigata.
akiri 2 igi posedanta = - monon,
malsanon.
akno haŭta abceseto.
akompani 2 iri kun | muz. ludi
partituron harmonie apogant-
tan la precipan.
akonito veg. (*aconitum napel*)
akordi 1 rilati harmonie = tonoj
D G B -as; adjektivo -as kun
nomo | -o: reciproka harmonio
| -igi, -igi: meti, veni en
titan staton.
akoro veg. (*acorus calamus*)
akra enigema | pri ŝtofo = pin-
to, glav - | pri sentoj = gus-
to, parfumo, bruo, lumo, ko-
loro - | pri animo = plezuro,
doloro - | komp.: spirito -.
akrido g. de ins. (*acridium*)
akro mez de ampleco | angla -
valoras 40 aroj, 47 centiaroj.
aksiomo propono akceptata sen
pruvo kiel vero = *enhavanto*
superas enhavaton.
akso linio rekta traŭranta cen-
tron = turna -; - de la homa
korpo, de rado | -ingo: parto
en kiu - turniĝas.
akto skribaĵo konstatanta ian
fakton = edziĝa - | dramero.
aktuala (fil.) aganta, efikanta =
volo, intenco.
akuri 2 fari kun atento kaj laŭ
sia plena devo = - sian labo-
ron; - ke ĉio estu en ordo |
-ata: farata kun zorgo, kun
atento, ĝusta, preciza = pre-
ĝo, kopio - | -ate: zorge, aten-

te, precize, ĝuste = imiti - ; pagi - ; veni ĉe la oka - .
aruzi 1 esti naskanta.

aruzativo kazo gramatika signata per N fina.

Oni uzas akuzativon

1* por montri pasivan komplementon de verboj de 2* klaso : li amas min kiel sian filon.

2* kun aliaj komplementoj oni povas, anstat. nominativo post prepozicio uzi akuzativon sen prepozicio se la senco permesas : vagadi longan tempon, obei la patron, tio kostas unu frankon, transiri la maron ; ĉirkaŭi urbon ; pardoni malamikon, peti pardonon.

3* post vortoj, kiuj montras lokon al kiu oni direktigas : kien vi iras ? - Mi iras en la ĝardenon. Tamen post al kaj ĝis, oni ofte ne metas l' : iru al la domo, salti ĝis la luno.
Vidu : *Esperanta Sintakso*, § 118.

arkivlegio veg. (*aquilegia vulgaris*).

arkvo ŝtofo fluida (monoksido de hidro) |-umi : doni akvon = akvumi paperon, praton |-melono : nomo de diversaj veg. (*Citrullus vulgaris*, *cucurbita melopepo*, etc.)

al prepoz. montranta 1* lokon kien la subjekto iras, sin turnas = mi iras - Parizo, rigardi - la ĉielo, pensi - sia patro, amo - Dio, dank' - vi | 2* rilato de posedo = la rozo apartenas al Teodoro, lasu tion - la infanoj, tio-ĉi estas - mi. alabastro nomo de iaĵ ŝtonoj. alaŭdo birdo (*Alauda arvensis*) albatrozo birdo (*Diomedea exulans*)

albumeno organika ŝtofo. albumo kolektilibro, kajero por paperaĵoj, desegnaĵoj, memskribaĵoj, poŝt-markoj, sekaj vegetaĵoj.

alciono birdo (*Alcedo hispida*) aldo arca muzikilo pli basa ol violono.

aleo vojo tra arbaro, ĝardeno. aliu kiu ne estas la konsiderato = mi parolas pri tiu homo, kaj

ne pri - | alio : aliu aĵo | alia : malsimila, alispeca | aliam : en aliu tempo | aliloke en aliu loko | aliel : per aliu maniero, kc. alko mam. (*Aloes palmatus*)

alkoholo ŝtofo fluida brula (ditanolo, etanolo).

almozi 1 fari donacon al malriĉulo.

alno veg. (*Alnus viscosa*)

aloo g. de veg (*Aloe*) |-aĵo : rezino laksiga.

alta longa laŭ vertikala amplekso = arbo - | malproksima supren = nubo - ; komp : pensoj altaj.

altaro meblo aŭ konstruaĵo difinata por sankta ofero.

alteo g. de veg. (*Althæa*)

altermi 1 pri du agoj aŭ aĵoj regule sekvantaj unu post aliu = nokto -as kun tago ; movo -a ; folioj -aj ; ni deĵoras -e.

aludi 2 vekli en la penson de la aŭdanto ideon ne precize esprimatan en la parolo.

alumeto ekbruligilo.

aluminio ŝtofo simpla metala. (Al = 26,9)

aluno ŝtofo sala (kalia) alumini-sulfato hidrata)

amaso kvanto da ŝtofo : - da nego, sablo, fojno | aro senorda d'objektoj : - de ŝtonoj, steloj, brutoj |-igi : kunigi senorde.

ambau adjektivo nombra ; unu kaj aliu, kiam estas nur du = li havis nur du filojn, - mortis |-sekse : kiu havas signojn de la du seksojn.

amboso maso de fero sur kiu oni forĝas pecojn de metalo.

amelo ŝtofo organika kiun oni trovas en diversaj veg. (solano, tritiko, dalio, kc.)

ami 2 senti impreson altirantan por iu aŭ io |-a : sento aliga, emo spirita = amika -, sekse - ; - al Dio, al la beleco.

amiko amatulo |-eco : amo ne sekse por iu homo.

amoniako gazo alkalia (azotidrido NH³) | solvaĵo de tiu gazo | sal- : amoniklorido.

amoniemo hemia radikalo NH⁴ ampleksi 1 havi vaston, areon, longon de... |-o : grandeco

amuzi 2 distri, ridigi, plezurigi.

analizi 2 malkunmeti, malkomponi, diserigi, disligi partojn.

ananaso veg. (*Ananas*)

anarĥio socio sen estra regado |-ismo : dogmaro -a |-isto : partiano de - |-eco : stato -a, ankaŭ : anarkio.

anaso g. de birdoj (*Anas*)

anemono g. de veg. (*Anemone*)

angelixo veg. (*Archangelica officinalis*)

angilo g. de fiŝ. (*Anguilla*) | elektro - : fiŝo (*Gymnotes*).

angulo nomo de diversaj geometriaj figuroj :

1* angulo linia : spaco difinata sur faco ia per du linioj kruciĝantaj : - kurblinia, rektlinia | - rekta : a. difinata per du rektlinioj perpendikaj | plan-eco : grandeco de - ; rilato de a. ia al angulo rekta.

2* angulo vasta : spaco difinata per konusa faco ia : - konusa, multplana | - trirekta : difinata per tri planoj reciproke perpendik. | vast-eco : grandeco de a. vasta ; rilato de a. vasta al a. trirekta.

angulo duadra : v. duedro.

tri-o, mult-o : figuroj je tri, multaj - o | -ilo : -mezurilo.

angelo kreaĵo nur spirita. (teol.) angino malsano de gorgaj membranoj.

animo parto spirita de l'mio | vorto esprimanta kune kaŭzon de sentado, komprenado kaj volado.

anizo veg. (*Anisum*)

ankaŭ prep. ; same = vi kredas tion, mi - ; li ne venis, mi - ne ; ne nur., sed - | samtempe = li estas bela, sed - malbone | eĉ = mi tion kredos - se vi neas ; tio igas lin - pli kulpa.

ankoraŭ prep. ; ĝis tiu tempo = li vivis - la lastan jaron, kiam

li estis - infano | malb : jam, ankaŭ, ree.

ankro ilo por nemovebligi ŝlipon | hoko duobla.

ano alvorto : montras kiu enestas ian aron = societano, landano.

anonci 2 sciigi, igi sciata.

ansero birdo (*Anser*).

anstataŭ prep. ; en loko de = li prenis mian ĉapelon - la sian | -i : esti en loko de = hodiaŭ li -as al mi (aŭ min)

en mia ofico |-igi : veni en loko de = suno -as al nuboj (nubojn), Tiberio -igis Oktagon |-igi : meti en loko de = oni -igis lin al mi en mia ofico.

antaŭ prep. kiu rilatas ĉion kio estas je unu flanko de l'o konsiderata, la cetero estante post

pri loko : li iris - la ĉaro, kaj mi post ĝi ; la hundo staris iom - kie la leporo kuŝis ; ne faru tion - [kie] mi [estas].

pri tempo : mi konis lin - lia edzigo, sed ne post tio ; venu ĉe min - kiam mi foriros ; - ne longe ; mi lin vidis - tri tagoj kaj lin revidos post ok ; ne faru tion - [kiam] mi [tion faros].

Vidu : E.S. § 130. Rim.

ankaŭ : antaŭ ol ; antaŭ, post ke.

-a : kiu estas antaŭ = sur -a parto ; dum -a tempo, en -a ĉapitro | -tempa : kiu okazas - sia tempo, trofrua | -e : adv. loka aŭ tempa = stari -e ; foriri -e | -i : esti, stari antaŭ = fosaĵo -as la muron ; floro -as frukton | -igi : igi -io = li foriris antaŭ (kiam) mi, sed mi baldaŭ -igis al li (aŭ lin) | -igi : meti -io = estas absurde -igi ĉaron al ĉevaloj | ĝi -tempa = li -igos horon de sia morto.

antikva malnovega | -e : laŭ -maniero ; dum - tempo.

antimono ŝtofo simpla metalojda (Sb = 119,3).

anuso elirejo natura de l'intesto.

aparato ilo, maŝino = skrib-, distil -.

aparta ne komuna = ĉambro, ideo |-| -e ; ne kune, sole = paroli -e ; konsideri ĉiun eron -e.

aparteni 1 esti propraĵo, posedado de iu = la rozo -as al Teodoro.

apenaŭ preskaŭ ne = audi - ; mangi - sufiĉe por vivi ; li - ne falis.

aperi 1 igi vidata, videbla.

apetito deziro de satigo.

apio veg. (*Apium graveolens*).

aplaŭdi 1 plaŭdi per manoj por esprimi aprobon, admiron, kc.

apogi 2 porti, subteni pezon aŭ parton de l'pezo = trabo -as tiun muron ; ŝtonoj de arkajo -as sin reciproke ; tio -as mian opinion ; muziko -as kanton ; sin - per bastono, per kruroj |-o : helpo fizika aŭ morala.

apro mam (*Sus scrofa*).

aprobi 2 opini ke io estas bona kaj laŭdinda ; montri tiun opinion.

apud prep. ; en spaco plej proksima de = lia domo staras - la mia | -a : kiu kuŝas plej proksime = ĉambroj, anguloj -aj.

araneo g. de bestoj (*Aranea*) |-eĵoj : dua klaso de artik-membruloj (zool).

-ar' alvorto ; montras nombron de samaj objektoj kunigitaj | aro : kolekto = la tuto estas - de siaĵeroj.

arangi 2 igi taŭga por difinita celo = birdo -as herbojn por sia nesteto ; - maŝinon ; rakonton, projekton, societanon.

arao g. de bird. (*Ara*)

arbitri 1 agi sendepende, kiel : senpartie, senpasive, aŭ

eĉ : malsaĝe, malĝuste ; plej ofte juĝi laŭ prudento, sen dependo de lego aŭ de supra povo, kaj ne revokeble |-a : memvola = decido |- -a : laŭ kune, libere = elekti |- -acio : juĝo - ; -ado |-ebleco = neniu havas plene liberan-.

arbo vegetaĵo kun ligna trunko | -arejo : loko kie kreskas arboj |-eto : malalta arbo.

arbuto veg. (*Arbutus unedo*).

arĉo vibrigilo por kordaj muzikiloj.

ardeo birdo (*Ardea cinerea*).

ardezo speco de ŝtono tavolo.

ardi 1 varm lume = la suno -as |-a : brulluma, ruĝa : fero - ; fadeno - (de lampo elektra).

areo parto de spaco difinita sur faco = elinsa, sfera |-eco : grandeco de -.

aresti 2 kapti kulpulon aŭ suspektulon malliberigotan = li estis -ita en Ameriko.

argilo speco de ŝtono modelebla (aluminisilikataĵo).

argono ŝtofo simpla gaza. (A = 36,6).

argumenti 1 konduki al kredado per rezonado |-o : formo regula de rezonado = silogismo, dilemo, kc. estas -j.

argento ŝtofo simpla metala (Ag = 107,12)

arĥitekto kaj -iko : scienco de konstruado |-isto : de tiu scienco.

ankaŭ : arĥitekturo, arĥitekturisto, kaj ark-.

ario muzika frazo.

aritmetyko scienco de nombrado.

arko peco de kurblinio, plej ofte de rondo aŭ elipso |-o, -aĵo : objekto tiaforma = ponta - , triumfa -, sagarko, kc. | -eto : malgranda -, arĉo, kc. | -efleksi ; kurbigi arkforme.

arlekono amuzisto, jonglisto maske vestita = l' - de la reĝo.

armeo militistaro: soldatoj kun nemilitantoj | -ano: ĉiu kiu akompanas armeon.

armi 2 provizi per necesaj iloj = ŝipon, -aparaton plej-ofte per bataliloj: -soldatojn, -fortikajon | -o, -aĵo: ilaro = ĉevalo -; -de elektra Lejda botelo | -o, -ilo: bataliloj = ŝildo, glavo, kiraso estas -j.

arniko veg. (*arnica doronicum*).

aro 1° alvorto: montras multon da samaj objektoj formantaj kune tuton = arbaro, humaro, ŝtuparo.

2° mezuro de areco (100 m. kv)

arogi 2 pretendi al, elpostuli ion sen respekto de rajtoj de aliu = leono -is al si la plej bonan parton; tiu policano -as al si senliman povon | -a, -anta: kiu pretendas malrajte al io; plejofte pri estimo, obeo, kc.; malgentila, fiera = ofte novriĉulo estas -.

arseniko ŝtofo venena (*arsena pentoksido*).

arseno ŝtofo simpla metalojda (As = 74,4)

artemizo g. de veg. (*artemisia*).

arterio sanga fluejo dekora.

artifiko maniero speciale elpensata por sukcesi je io = li evitis la malfacilon per stranga -; ruzo kaj insido estas -j malaŭdindaj.

artiki 1 esti ligata tiel ke ia movo estas ebla = korseto de insektoj -as kun ventro | -o, -aĵo: loko kie unu aŭ multaj pecoj de aparato ia -as: osta -; ĉiumova - de Kardan' | el-igi: disigi la pecojn de artikajo | -membruloj: dua branĉo de la ĝenerala klasigo de bestoj; 5 klasoj: *krustuloj, aranejoj, milpiedoj, oniĥoforoj* kaj *insektoj*.

artikolo 1° speco de vortoj, (la).

En Esp. estas nur unu formo de a. Vorto la havas preskaŭ sencon de montra adj. tiu; oni uzas ĝin nur kun vortoj jam difinitaj aŭ tuj difinitaj:

a) aŭ per antaŭa parolo: *hundo persekutus leporon*; lacigante la leporo sin kasis.

b) aŭ per anoncata tuja klarigo: la demando estas jena: *hial vi...*

c) aŭ per almeta frazo: jen estas la pomo kiun mi trovis; vi estas la homo, kiu jam hieraŭ venis.

d) aŭ tiel ke ĝi estas sola en sia maniero, aŭ enhavas la tuton de unu gento: la suno brilas; la Japanuloj estas flavaj; la halo estas malamiko de la rato.

Rim. oni vidas ke, en tri unuaj § la = tiu, kaj en kvara, la = ĉiu.

Vidu: E. S. 8: II. kaj Lingvo Internacia n° 93, p. 212.

2° peco, parto difinita formanta mem tuton: - de lego, - de gazeto; - de insekto.

artiŝoko veg. (*cynara scolymus*).

arto kapablo utiligi naturajn fortojn por realigi ion kiu ne estas en la naturo: la - de konstruado, tiu altaĵo estis kreita per - | bel-: arto efiki impreson de belo sur aliu = poetarto, pentrarto estas senperaj belarto, dum kantarto, dramarto, muzikarto bezonas realigantojn | -a: artefarita, nenatura = Esperanto estas -lingvo; -rivero; -fajro | bel-a: kiu rilatas belarto = je ĉiu homo estas -sento | -isto: kiu havas arton; ofte = belartisto.

artrito malsano de artikoj. ascito akvomalsano.

asekuri 2 fari ambaŭligan kontraktan (asekura akto) tian ke iu, nomata -anto pagos al aliu, nomata -ato, sumon difinitan en difinita okazo, kondiĉe ke l' -ato pagu al -anto difinitan renton = asekurantaj societoj -as kontraŭ

brulo, drono de ŝipoj, perdo de rikoltoj, kc. | -igi: igi asekurata = mastro devas -igi siajn laboristojn kontraŭ metiaj riskoj; patro saĝa -igas sian familion kontraŭ sia morto.

Esprimo mallonga: asekuri rikolton, ŝipon = asekurigi sin kontraŭ perdo de rikolto, drono de ŝipo sia, kc.

asfalto speco de bitumo firma.

asfiksio sufoko, halto de la spirado.

askarido intesta vermo (*ascaris*).

aso V. ludkarto.

asparago g. de veg. (*asparagus*).

aspido serpento (*vipera aspis*).

aspiri 1 (al) deziri, sopiri por: - al la gloro | -anto: kiu -as al io = aspiranto-kapitano.

asterio g. de bestoj (*asterias*).

astero g. de veg. (*aster*).

astro ĉiela korpo = sunoj, planedoj, stelnebuloj estas -j.

ataki 2 ekmalpaci, ekbatali kun, komenci militi kontraŭ = la ventego -is subite la ŝipon; soldatoj -as la malamikojn; la dubo -sin | -o: ekmalpaco, ekbatalo = ricevi -n de malamikoj, suferi -n de malsano.

atenci 1 entrepreni atakon kriman (malmulte uzata).

atendi 2 resti ie ĝis okazo aŭ veno de io = vi -u tie ĉi ĝis mia reveno, aŭ mian revenon, aŭ atendu min; - la vagonaron en la stacidomo; - la tagigon, leteron, kc. | -a: kiu utilas anstataŭ estonta = regularo -a, konstruaĵo -a; ĝis kiam oni estos fininta la novan domon, mi loĝos atende tie ĉi.

ateneo noktobirdo (*athene*).

atenti 2 direkti sian intelekton al io = - argumentadon, -

problemon; legi -e, kun -o; aŭdantaro -a, lernanto -ema; li promesis meti -on al mia peto aŭ -mian peton.

atesti 2 certigi la verecon de io = mi -as jure ke la afero tiel okazis; ŝiaj larmoj -is ŝian doloron; malvere - | -o: certigo pri io = - pri lernado, - pri kapableco; forlasa - | -anto: kiu -as.

atingi 2 frapi, aŭ preni ion malproksiman, = la sago -is birdon flugantan; li estas tro malgranda por - la fruktojn de l' arbo; tiu pafilo -as je 800 metroj | kompare = ni post longa laboro -os la celon; peni -.

atlaso 1° speco de silka teksaĵo | 2° kartlibro = geografia -.

atriplo v. g. (*atriplex hortensis*).

aŭ elektiga vorto (kunjunkcio alterna).

aŭ devigas elekti inter la proponaĵoj kaj formeti la aliajn = aŭ vi min mortigos, aŭ mi vin mortigos; aŭ vi estos kulpa, aŭ mi estas kulpa; *pli mallonge*: vi aŭ mi estas kulpa; elektu lin aŭ min; li aŭ lia frato ne venos: unu devas resti hejme.

aŭdi 2 ricevi impreson de sonoj | -o, -ado: impresio efikata de sono sur spirito; kapablo ricevi tiun impreson | -itorio: aŭdejo.

aŭkci 1 proponi pli altan prezon por vendotaĵo | -o: surpropono | -e vendi: vendi al la plioferanto | -isto: kiu faras aŭkciajn vendon.

aŭrikulo veg. (*primula auricula*).

aŭskulti 2 aŭdi kun atento = oni devas ne nur aŭdi profesoron, sed ĝin aŭskulti; mi aŭdis kvankam mi ne aŭskultis.

aŭtoro kreinto, verkinto.

avari 1 ŝparegi = avari sian penon, - en sia mangado | -a: ŝparema, plej ofte pri mono | -ulo: monamegulo.

avelo, -eto fruktoj de avelarbo (*corylus avellana*).

aveno veg. (*avena*).

averti 2 1° informi, antaŭsciigi = averti nin kiam li venos. † 2° deigi, deturni = averti dangeron.

avidi 2 havi grandan emon al, deziregi = avidi gloron, ricecon, kc. | -a: ema, dezira = rigardo avida.

avo patro de l' patro aŭ de la patrino.

MI

PATRO		PATRINO	
AVO (patra)	AVINO (patra)	AVO (patrina)	AVINO (patrina)
avopatro	avopatrino	patravo	patravino
		patrinavo	patrinavino
		avinopatro	avinopatrino

avizi 2 informi, sciigi | -o: sciigo, informo, anonco.

azeno mam. (*equus asinus*).

azoto ŝtofo simpla gaza (N = 14,01).

ankaŭ nitro, nitrogeno.

polvon, la fumon | -ilo: fasko de junko aŭ branĉaĵoj, aŭ brosego kun tenilo por purigi la plankojn, la kortojn, kc.

balanci 2 movi alterne ĉirkaŭ punkton fiksan | -igi: movigi balance; kompare: dubi antaŭ malaj decidoj = mi -as ĉu mi venos aŭ ne.

balbuti 1 havi malfacilon por paroli.

baldaŭ adv.; post mallonga tempo: mi revenos -; ĝis -!

baleno g. de mam. (*balæna*) | -aĵo: korneca ŝtofo en buŝo de iaj -oj.

balsono elstaranta teraso antaŭ fenestro.

balo kunveno dancanta: partopreni -on | -eto: danca teatraĵo | -etistino: dancistino por baletoj.

baloti 1 elekti per kalkulo de opinioj esprimataj: ili -is por rajtigi delegaton.

balzamo nomo de kelkaj rezinoj aromaj: mirho, benzoo, olibano, kc.

bambuo veg. (*bambusa*).

bandaĵo aparato kuraca por vundoj, ostrompoj, hernioj, kc., kc.

banderolo peco de rubando papera dediĉata al ia uzo: imposta -, poŝta -, sigela -.

bando aro senorda de homoj aŭ bestoj: - da rabistoj, - da korvoj; vintre la lupoj iras bande.

bani 2 trempi en akvon: sin - en maro.

banko komerco de mono. mb. bankiero, anstat. bankisto.

banto ligajo da rubandoj.

bapti 2 doni bapton | -o: la unua sakramento de l' Eklezio.

barako dometo, domaĉo, buĉaĉo.

barbastelo vesperto (*synotus barbastella*).

barbo mentonhararo.

mb. barbiero, barbiro, anstat. barbisto.

barelo ligna likvujo cilindrumoforma.
bari 2 trafermi, starigi obstaklon tra : -la vojon, la vidon, la esperon.

mb. bariero anstat. barilo, bartrabo.
barikado (milit.) barajo, obstaklo nepreparita.

barko akvoveturilo : boato, ŝalupo, pramo estas barkoj | **flos** -: trabajaro arangata kiel barkajo.

bario ŝtofo simpla metala (Ba = 136,4) | **barito** : barioksid.

barono titolo nobela.
basko parto flaganta de iaj vestoj kiel frako, jako, kc.

baso muzikilo, kantisto kiu produktas sonojn basajn | -a, -e: v. soni.

bastardo filo de adultulo.
basto interna parto de l'arba ŝelo.

bastono longa peco de ligno, branĉo aŭ trunko de arbeto : -de promenado, -de flago, -de bilardo, -d'episkopo, lam-ke.

batali 1 agadi per malamikaj faroj = pugne -, parole - | **komp** : -kontraŭ la malklereco, -por la sukceso de Esperanto | -o : perforta agado = la -por la vivo ; milite = sanga - ; ŝipa - | -anto : kiu batalas = militisto -a.

bataliono (milit.) aro de piedraj militistoj sub ordonoj de komandanto = bataliono estas dividata je rotoj.

baterio aro d'aparatoj similaj kune agantaj = elektra -, kانونa -.

bati 2 doni unu aŭ kelkajn frapojn, frapadi : -grenherbon, -feron varman, plat-oron, al-najlon ; ho mia kor' ne u maltrankvile | por dolorigi = infanon, -ĉevalon per la

vipo | -o : frapo = la horloĝo sonoris dek batojn.

batraĵoj dua klaso de vertebruloj, enhavanta ranoj, bufoj, tritonoj, salamandroj, kc.
bedaŭri 2 malĝoji pro perdo, malsukceso, eraro, malprofito ia = -tempon pasintan ; -monon, amikon perditan ; -bonan okazon ellasitan ; -malĝustan parolon, malbonan faron ; -sian junaĝon | -o : malplezuro pro pasintaĵo = li forlasis ŝin sen - ; mi mortos pro - ; bedaŭre mi ne povas.

bedo (ĝardenarto) malgranda spaco da tero pli longa ol larĝa sur kiu oni kulturas = -de tulipoj, -de salatoj.

bedo korna buŝo de birdoj = ornitorinko estas la sola kvarpieda besto kiu havas -on | -i : frapi per -.

bela kiu efikas impreson agrablan, ĉu vide : - koloro, viro, pejzaĝo, pentraĵo, kc., ĉu aŭde : -voĉo, kanto, muziko, kc., ĉu ideoe : -ago, versaĵo, rakonto, kc. | -o : kaŭzo abstrakta de tiaj impresoj = ni sentas la -n, ne povante ĝin difini ; ĉiu homo havas amon al la - | -arto : arto elveki en l'animo impreson de belo : pentrarto, muziko, literaturo estas bel-oj ; belarta revuo ; ne ĉiu pentristo estas bel-isto | -eco : propreco de aĵoj belaj = la -eco estas nedaŭra | komponaĵoj : belulo, belparolulo, belskribarto, ktp ; ornamoj povas pli-igi belajon, sed kiel ajn oni ornamu mal-ajon, oni ne povos ĝin beligi.

benko sidejo larĝa kun aŭ sen dorsapogo por kelkaj personoj.

beni 2 fari religiajn ceremoniojn favorigajn pri aŭ por iu aŭ io = beni preĝejon, fla-

gon, geedzojn, popolon | parolante pri Dio : favori = Dio vin benu | vi estas benata ĉiuj virinoj.

benzeno aŭ **feno** hidrokarbido vaporigema kaj odora (C₆H₆) | **benzino**, **benzolo** : komercaj malpuraj benzenaj miksaĵoj | **benzoo** : aroma rezino tirata el arbeto *stirako benzoa*.

Vidu *feno*.
bero frukto karna, sen kerno : -de groso | -aro : grupo de beroj fiksitaj sur sama trunketo : -de riboj, de vino.

besto organisma estaĵo sentema kaj propramova ; v. *zologio*.

beta veg. (*beta*).

betulo arbo (*betula*).

bezoni senti ke io estas necesa (per si mem aŭ por ia celo) = ĉiu -as ami ; oni -as legon ; mi -as panon ; nia ideo -as tempon por sukcesi | -o : sento de neceseco = la -oj de la vivo ; mi havas urĝan -on de mono ; tiu malfeliĉulo estas premata de -o.

biblioteko libraro, librarejo, libroŝranko, kc.

bieno posedaĵo konsistanta el tero kulturita aŭ ne kun ĉiuj dependaĵoj | -ulo : posedanto de - | -etato : registro kiu enhavas la detalan priskribon de landaj bienoj.

biero fermentinta trinkaĵo, preparita per hordeo kaj lupolo | -ejo : biertrinkejo.

bilanco etato aŭ inventaro de l'debito kaj kredito de negocisto.

bilardo tablo pli longa ol larĝa, kun elastaj randaĵoj, sur kiu oni ludas per ostaj buloj = ludo de -.

bilo ĉiu skribaĵo havanta legan valoron, dokumento, aferpapero, kc. = kambio, akcio, akto, kc. estas -j | -eto : malgranda bilo, sultatesto =

li subskribis dek -jn je diversaj datoj ; -de banko.

bindi 2 kunkudri kajerojn de libro kaj surmeti kovrilon.

binoklo duobla lorneto.

birdo dua klaso de vertebruloj ; la -havas du piedojn, du flugilojn, bekon, estas kovrita per plumoj kaj naskas ovojn.

biskvito pano du aŭ trifoje kuirita por ĝin igi pli konservebla = por longaj vojaĝoj oni ne foriras sen - | kukajo | speco de porcelano sen glazuro.

bismuto simpla ŝtofo metala (Bi = 206,9).

bistro maldensa fulgakvaĵo ; koloro rustoflava.

bisturio hirurgia sektilo.

bitumo natura miksaĵo de diversaj hidrokarbidoj kiun oni trovas en iaj teroj.

Sub tiu nomo oni kunigas tre diversajn stofojn kiel : *naftoj* *, pli malpli likvaj ŝtonoleoj ; *malto*, aŭ ŝtona peĉo ; *elaterito*, aŭ ŝtona kaŭĉuko ; *asfaltoj* * kc.

blanki 1 havi koloron de ordinara suna lumo * | -o : sunluma koloro | -a : kiu havas tiun koloron = lakto, nego estas -j | -aĵo : io blanka = blankaĵo de ovo.

blasfemi 1 ofendi parole al Dio, al sanktaĵo | -o : malpia parolo.

blato g. de ins. (*blata*).

bleki 1 krii, pri bestoj kvarpiedaj = bleki kiel leono, kiel ĉevalo, kiel porko, kiel rano.

blendo natura zinkosulfido.

blinda kiu ne havas aŭ perdis la kapablon vidi | -ulo : homo kiu estas -a | -igi : perdis la kapablon vidi = oni -igis lin per arda fero ; **komp** : la brilego de l'suno min -igis ; li havas -igantan spiriton !
bloki 2 senmovigi, haltigi la movadon, la agadon, la viva-

don | *meĥaniko* ; -ŝraŭbilon : ĝin puŝi tiel profunde kiel ĝi povas iri ; -haltigilon : ĝin streĉi tiel ke ĝi ne povu premi plie | *masonarto* : ŝtopi per ŝtonaĵoj interspacon de du muroj tiel ke ili formu nur unu firmaĵon | *tipografarto* : meti pecon aŭ returnitan tipon anstataŭ nelegebla vorto aŭ litero | *militarto*, -urbon, havenon : ilin ĉirkaŭi tiel ke ili estu plene izolitaj de l'ekstera lando aŭ maro = paca -ado, kontinenta -ado | -sistemo : sistemo kiu permesas en okazo de danĝero haltigi ĉiun movadon de vagonaroj sur parto de la fera vojo, kc.

Rim. La senco de tiu vorto, kiel de la sekvanta, estas ĝis nun malbone difinitaj en Esperanto.

bloko 1^o rado turnanta ĉirkaŭ akso kaj laŭ kies rando kuras ŝnuro, rimeno aŭ plata ĉeno ; la ĉirkaŭrando de ŝnur-estas kava, tiu de rimeno- male estas iom konvekca kaj tiu de ĉeno- estas dentumita tiel ke al ĉiu dento respondas truo de ĉenero | 2^o ŝtupo ? maso ?

blonda koloro hele flavbruna aŭ pale kaŝtana = haroj -aj.

blovi 1 elspiri forte = li -as brue ; - sur siaj fingroj ; - sur kandelon ; - en fajfilo | **komp** : vento -as malvarme ; -adis terura huragano | -ilo : instrumento por fari venton = forĝ-ilo, fajr-ilo ; -ilo de orgeno | -instrumento : muzikilo kiun oni movas per blonado = fluto, klarneto | -pafililo : tubo per kiu oni povas eljeti sagojn aŭ kugletojn enblovante for- : forigi blovante = for-polvon.

blui 1 havi koloron pli malpli similan al tiu de la strio G de l'suna spektro | -o : tia

koloro = la -o de pura ĉielo | -a : tiakolora = cejano estas -a.
bo- alvorto, montras parencecon rezultate de edzeĉo | -**patro**, -**patrino**, -**gepatroj** : gepatroj de l'edzo aŭ de l'edzino | -**frato**, -**fratino** : 1^o gefratoj de l'edzo aŭ de l'edzino ; 2^o edzo de la fratino, edzino de l'frato ; 3^o edzo de la fratino de l'edzo aŭ de l'edzino, edzino de l'frato de l'edzo aŭ de l'edzino, kc. | -**filo** : edzo de l'filino ; -**filino** : edzino de l'filo | -**kuzoj**, -**avoj**, kc.

boao serpento (*boa*).
boato barko, barketo | **torpedo** : barko armita per torpedilo. v. *barko*.

bobeno cilindro sur kiu oni ĉirkaŭvolvas fadenon | **induktanta** - : elektra aparato konsistanta el bobenaĵo de kupra fadeno | -**umi**, **de-umi** : volvi, disvolvi fadenon ĉirkaŭ bobeno.

boji 1 bleki, pri hundoj | **komp** : bleki kiel hundo.

boli 1 esti en la stato speciala por likvaĵoj ; oni diras, ke likvaĵo varmigata *bolas*, kiam, la temperaturo ĉesante pliiĝi, la tuta varmo liverata al la likvaĵo estas uzata por ĝin vaporigi = akvo -as je 100 gradoj Celsiaj sub premo de 760 m/metroj de hidrargo | **komp** : esti agitata kiel akvo -anta = la ondoj -as furioze ; la kolero -as en li.

bombo esploda kuglego = ŝarĝo -on per dinamito ; oni jetas -ojn ĉu mane ĉu per paflego | **mar-** : esplodilo fiksitaj aŭ moveblaj en akvo kaj esplodonta ĉu per frapo, ĉu elektraj | -ilo : kanono por jeti -ojn | -**umi** : surjeti -ojn = la malamikoj -umis la havenon ; *ankau* : bombi, bombardi ?

bona 1° per si mem : kiu havas ĉiujn la ecojn proprajn al sia naturo, al sia difino = bona memoro, vido, farto ; bonaj versoj (korektaj) ; -landano obeas leĝojn ; - filo, edzo, -laboristo, -servisto akuras siajn devojn ; ironie : mi donos al li bonan venenon ; komp : tio estas - por perej | 2° rilate al ni : kiu estas taŭga por la uzo al kiu ni ĝin difinas, aŭ por tio kion ni atendas el ĝi = bonatero, - laborilo, - lito, - vino ; maro, vento - por ŝipiri ; -eco (t.e. utila al ni) ; -konsilo, - ideo ; - pentristo, -kuracisto ; -gusto, -odoro ; muziko, kc. kompone : bonstato, bongusta, bonodora, bonsona, kc. | 3° rilate aliu, pri homo, homaj pensoj kaj agoj liberaj : kiu havas la ecojn proprajn al la sociala naturo de l'homo = homo = estas tiu kiu penas fari por aliaj tion, kion li deziras por si mem ; li estas - kaj afable ; -ago ; -konduo, bonaj moroj, fari bonan uzon de io ; -konscienco, -intenco, -humoro komp : -animo, koro, parolo ; kompone : bonfaranto, bonintenco | -e : konforme al sia naturo, al sia difino, al sia celo = farti, vidi, memori bone ; paroli, labori - ; (tio estas) bone | rilate al ni : agrable = odori -, akordi - ; mi estas tre - tie ĉi | morale, socie : konforme al reguloj, al leĝoj = agi, konduti - | -o : morala perfekteco = la - konsistas el konformiĝo al la leĝo de l'devo.

borago veg. (*borrago*).
borakso salo (natriborato hidrata).
borderi 2 almeti, alarangi, alkudri randajon = -tukon, -

paperon per nigra strio ; -veston per punto.
bordo terrando apud akvejo = marbordo | -vojo, -strato ; irejo laŭ la bordo en haveno, tra urbo, kc.
bori 2 enfari, trafari truon | -ilo, -ileto : truŝraŭbilo.
boro metalojda ŝtofo (Bo = 79,36)
borso negoĉejo, komerĉejo publika.
botaniko parto de la sciencoj naturaj kiuj rilatas la kreskadojn.
Oni dividas ĉiujn vegetaĵojn laŭ 4 grupoj :
1° floruoj (unukotiledonaj, dukotiledonaj, nudsemaj),
2° filikajoj,
3° muskajoj,
4° likenajoj (alĝoj, likenoj, fungoj).
Tiu grupoj dividiĝas en klasoj, fakoj kaj subfakoj, gentoj kaj subgentoj, generoj kaj specoj. Fine en sama speco povas ekzisti diversaj rasoj.
botaŭro birdo (*botaurus*).
botelo vazo je mallarga kolo, kutime vitra.
boto leda vestaĵo kovranta la piedon kaj parton de la kruro.
bovo mam. (*bos taurus*).
brako membro supera ĉe homo kaj simioj | komp : brako de rivero | kompone : brakartiko, brakzono.
bramo fiŝo (*abramis brama*).
branĉo disiga parto : - de arbo, - de radiko, - de rivero, de vejno.
brando alkoholaĵo ricevita per distilo de diversaj fermentaĵoj.
branko respira aparato de iaj bestoj = fiŝoj, senpulmaj batrikoj estas -uloj.
brano restaĵo de kribita faruno, grenŝeloj.
brasiko veg. (*brassica oleracea*) | flor- : speco de brasiko

kies abortiĝinta floraro estas manglebla.
brava kuraĝa, sentima al danĝero | kompone : braveco, bravavo, bravulo, bravega, bravaĉa, kc.
breto tabuleto.
bridi deteni, malpermesi laŭvolan movadon | -o, -ilo : parto de kapjunaĵo kiu malpermesas troan movon = rimeno de brido, steĉi bridilojn.
briko kuirita argilo | konstrua, tegmenta - : diversformaj materialoj faritaj el briko.
brili 1 lumi tre forte kompare la ĉirkaŭaĵo = steloj -as en neluma ĉielo | re- : brili spegule = suno rebrilas sur kiraso, rebrilo de luno en lageto.
briono veg. (*bryone dioica*).
brodi 2 ornamaj por enkudritaj reliefaĵ desegnoj.
brogi 2 elmeti je l'ago de varma vaporo | kuiri en fermita vazo = brogita bovajo.
bromo simpla ŝtofo metalojda (Br = 79,36)
bronko pulma aervojo ĉe superaj bestoj | grandaj -oj : ambaŭ aervojoj kiuj daŭrigas la traheon | malgrandaj -oj : disforkaĵoj de grandaj b. | -etoj : lastaj branĉetoj kiuj finiĝas ĉe pulmaj ĉeloj | -ito : brulumo de la bronkoj.
bronzo kunfandajo diversproportcia de kupro* kun aliaj metaloj : stano, zinko, plumbo, aluminio, kc.
broso ilo formata el faskoj de fadenoj rigidaj kaj elastaj fiksitaj sur plato aŭ tenilo, kaj utilanta por purigi | -i : purigi frotante per broso | har-ilo, dent-ilo, cir-ilo : brosojn por purigi harojn, dentojn. por ciri, kc.
broŝuro nebindita libreto.
brovo arkajo superokula | hararo kiu ĝin kovras.

brui 1 eldoni sonon neprecizan, sonoraron konfuzan = arbaro -as, fonto -etas, akvofalo -egas ; oni aŭdis bruon de rompo. v. soni.
bruli 2 detruj per fajro = bruli paperon, ligno estas brulebla | -igi : esti detruata per fajro = la papero bruliĝis, alkoholo estas bruliĝema | ek-igi : inciti bruliĝon per almetata flamo, varmego, kc. = ekbruligi pulvoron, meĉon, kc.
Plej ĝenerale, oni diras ke ia ŝtofo brulas alian, kiam ili ĉie kombiniĝas eldonante varmon kaj lumon ; se unu estas gasa, la alia bruliĝas en ĝi. Tiel karbo bruliĝas en okso, arseno en kloro, kc. Kutime oni diras ke io bruliĝas kiam ĝi tute aŭ parte kombiniĝas flame*, lume kaj varme kun la okso de l'aero.
bruna flavruĝo pli malpli nigra = kaŝtano, kafo brulita, okro malpala estas -j.
brusto antaŭa parto de l'korpo inter la kolo kaj la ventro.
bruto besto, kontraŭe al homo = bubalo estas - ; kelkaj homoj sin malaltigas ĝis - ; hundon, pro sagaco, ni ne devus nomi - | -aro : bestaro utiligita en kamlaborado.
bubalo mam. (*bos bubalus*).
bubo petola knabo.
buĉi 2 mortigi metode | -isto : kiu mortigas kaj preparas la brutojn manĝotajn : bovo, ŝafo, ĉevalo, kc.
budo dometo, butiketo transportebla = safista - ; foira - ; -eto de gardsoldato.
bufo g. de batrikoj (*bufo*).
bukedo fasko da floroj.
buklo meĉo de haroj volvita ringforme ; ĉio tiaforma.
buko speco de ringo metala kun pikilo utilante por fiksi rubandon = buko de zono, de banto.
bukso veg. (*buxus*).

bulbo speciala ripoza formo de iaj vegetaĵoj : ajloj, lilioj, jacintoj, kc. | komune : speco de ajlo manĝebla (*allium cepa*).
buljono akvo en kiu oni boligadis ion por eltiri de ĝi ĉion solveblan | komune : likva manĝaĵo preparita per bolado de viando kun aŭ sen legomoj kaj spicoj en akvo.
bulo objekto proksimumesfera.
burdo g. de ins. (*bombus*).
burĝo historio : ano de la kasto meza inter la nobela kaj la popola.
burgono unua formo de nova kreskanta parto sur vegetaĵo = folia, flora -.
busto la kapo kaj la supra parto de l'korpo ĝis la subsultroj.
buŝelo mezurilo por sekaj materialoj ; (muna pariza buŝelo = 10 litroj).
buŝo supera enirejo de l'inter-na kavajo ĉe homo kaj bestoj | -umo : aparato malpermesante mordon = hunda, ĉasputora - | -peco : parto kiu oni metas en buŝo = - de fluto, de pipo, de ĉevala jungaĵo, kc.
buteo birdo (*buteo*).
butero grasajo tiritita el lakta kremo* | -igilo : aparato por disigi per batado la buteron de la selakto*.
butiko publika detala vendejo.
butono peceto el ostoj, metalo, kc. kiun oni alkudras sur vestaĵojn kaj kiu, eniĝante en respondajn ingojn permesas fermi aŭ malfermi tiun ĉi | -umi, dis-umi : fermi, malfermi per butonoj | -truo : fendo borderita farita en rando de vestaĵo por utili kiel butoningo.
C noto de muziko.
cedi 1 ĉesi kontraŭstari = la

digo -is sub la premo de l'akvaro ; post longa rezisto, ŝi -is je mia petego | -ema : oni devas esti -ema kun maljunuloj.
cedro arbo (*cedrus*).
cejano veg. (*centaurea cyanus*).
celerio speco de apio kulturata.
celi 2 rigardi por atingi = celi birdon per pafilo, celi pejzaĝon per fotografilo | komp : deziri, direkti sian penon al : - la gloron ; en kia celo ? | -ilo : pinto, truo, linio, kc. kiun oni utilas por celi | -o, -aĵo : kion oni celas.
cemento pulvo ricevita per kuirado de kalkŝtonoj enhavataj de 30 ĝis 60 pro 100 da argilo kaj utiligata por konstruado en malsekaj lokoj.
Tiu miksaĵo de kalko* kaj argilo sekegaj formas je l'efiko de l'akvo, tute nesolveblan kalcialuminisilikaton tre malmolan. Miksate kun sablo, ĝi donas subakvan morteron*.
cendo monero ; amerika cendo = 5 c. 1/4 ; belga cendo = 2 centimoj.
centro punkto de simetrio* = centro de rondo, de sfero, de kvadrato, de kubo, kc.
cerbo amaso da nervaĵo kiun enhavas la kapo de superaj bestoj | -eto : posta parto de la cerba maso.
cerio metala ŝtofo (Ce = 139,2).
certa nepre vera, kiu nepovas esti falsa, pri kiu ne estas eble dubi = lia morto estas afero - ; estas certe ke du kaj unu estas tri | -igi : igi -, nedubebla = tio -igis al mi lian kulpecon ; mi -igas al vi (aŭ vin), ke...
cervo mam. (*cervus elaphus*) | norda - : mam : (*rangifer*).
cetera kiu estas ekster la nombro de la konsideraĵoj = kelkaj birdoj falis je la pafilo, la

lian kulpecon ; mi -igas al vi (aŭ vin), ke...

cervo mam. (*cervus elaphus*) | norda - : mam : (*rangifer*). cetera kiu estas ekster la nombro de la konsideraĵoj = kelkaj birdoj falis je la pafo, la ceteraj forflugis | -i : resti = ceteras multo farota.

Cetera rilatas nur la nombron, alta la kvaliton. Ekz. el ludkartaro mi prenas kelkajn ruĝajn kaj lasas la ceterajn (ruĝaj aŭ ne) - mi prenas ĉiujn ruĝajn kaj lasas la aliajn (kiuj ne estas ruĝaj).

La esprimojn kaj ceteraj, kaj cetera, oni skribas mallonge : kc, aŭ &c.

cezio metala ŝtofo (Cz = 131,9) | ĉi pronomo de la dua persono ununombra, formo neĝentila | pli ofte oni uzas v².

ciano hemia komponaĵo, nitrokarbido CN | -a acido : cianhidrido, acido cianhidrata.

cibeto mam. (*viverra civetta, zibeth*).

cicero veg. (*cicer*).

cidonio speco de pomarbo (*cydonia*) | -pomo : frukto de -.

cidro pomvino.

cifero signo de nombro. v. numerado.

La ciferoj uzataj en sistemo dekopa estas : - 0 (nul) - 1 (un) - 2 (du) - 3 (tri) - 4 (kvar) - 5 (kvin) - 6 (ses) - 7 (sep) - 8 (ok) - 9 (naŭ) - al kiuj oni aldonas por sistemo dekuopa (duzopa) : - 10 (dek = 10) - kaj - 11 (elf = 11).

cigaro rulaĵo de tabakfolioj | -edo : cigareto vindita en papero.

cigno birdo (*cycnus*).

cikado ins. (*cicada*).

cikatro postsigno de vundo | -igi : sin fermi, saniĝi, pri vundo, brulo, ke.

ciconio birdo (*ciconia*).

cikorio veg. (*cichorium intybus*).

cikuto veg. (*cicuta*).

cilindro geometria figuro for-

mata per translokigo de rekta linio ĉiam paralela al direkto fiksa.

cinamo ins. (*cimex lectularium*).

cinabro natura ruĝa merkursulfido.

cinamo arbo (*cinnamomum cassia*) | -basto : spicaĵo.

cinĉono arbo (*cinchona*) | -ajo : kontraŭ febra ŝtofo tiriti el basto de - ; v. kinino.

cindro nebrulebla restaĵo el brulaĵo | -kolora : hele griza.

cipreso arbo (*cupressus*).

cirkelo ilo por desegni rondojn.

? cirko ronda teatro | ? cirkonferenco : rondrando, rondlinio | ? cirkuli : rondiri | ? cirkulero : rondiranto, noto, avizo.

cirkonstanco specialaĵo de okazo = agi laŭ la -oj ; la retorkistoj diris ke -oj respondas al la demandoj :

kiu ? kio ? kie ? per kio ? kial ? kiel ? kiam ?

ciro ŝmiraĵo por briligati ledon = nigra -, flava - | -i, -umi : briligati per ciro.

citi 2 legi aŭ diri parkere pecon de verko ia kiel apogo de propra argumentado | -ato : peco citata.

citro muzikilo skrapkorda = harpo, liro, gitaro, mandolo, kc. estas citroj.

citrono frukto de -arbo (*citrus*).

civila propra al homo vivanta en supera stato socia = rilatoj -j, manieroj -j ; ĝentileco estas kvalito, -eco estas devo, eĉ rilate malamiko.

mb. : nemilita, nereligia, ŝtata, kc.

civilizi 2 civiligi, tiri el sovaĝeco, klerigi, altigi la staton socian = la devo de koloniantoj estas -, kaj ne esploti | -acio : civiliza, -eco, -ado, -igo, -iĝo, kc.

colo rusa mezuro = 2 cm. 1/2.

Ĉ (tŝo) konsonanto duobla plauda-blova muta.

ĉagreni 2 kaŭzi akran malĝojon, malkontenton = lia malbona konduto -as lian patri-

non | -igi : malkontentiĝi = pro honto ŝi mortige -iĝis | -o : malkontento = via neĝentileco kaŭzis al mi grandan -on ; malĝoĝejo silentas, ĉagreno plendadas | -a, -humora ; malĝoĝa, malkontenta, plendema.

ĉambro apartigita parto de loĝejo = dormo-, mango-, labor-.

ĉamo mam. (*rupicapra tragus*).

ĉano pafilarto : esplodiga frapilo.

ĉapelo bordhava kapvestaĵo.

ĉapo senborda kapvestaĵo ne kovranta orelojn, (v. kufa) kun aŭ sen sunŝirmileto = nokta -, fera -, milita -eto.

ĉar konjunkcio : pro tio ke, tial ke, kc. = donu al birdoj akvon, - ili volas trinki ; - ordinare ĉiu amas personon kiu estas simila al li, tial... ; la tranĉilo tranĉas bone, - ĝi estas akra ; -, tio ĉi estis feino.

ĉarmi 2 efiki plezurajn impresojn, altiri, allogi per agrableco : Orfeo -is la brutojn per siaj kantoj ; tiu knabino havis ĉarmajn vizaĝojn.

ĉarniro aparato artika, ordinare metala, kiu kunligas parton fiksan kun parto movebla ĉirkaŭ akso nomata ĉarnira akso : - de kovrilo (kun skatolo) ; - de pordo ; - de klapo.

ĉaro veturilo | kompone ; ĉareto, ĉaraĉo, tramĉaro, kc. ĉarpento trabajaro.

ĉarpita fadenajo, stupaja ricevita per maltekso de tolaĵo.

ĉasi 2 persekuti por kapti, por mortigi = - cervon, - perdri-

kon, - balenon ; vulpo -as en arbaro, aglo -as en aero, ezoko -as en akvo | -ajo : produktajo de ĉaso = mangi -ajon | kompone : ĉasisto ; ĉashundo, ĉasbirdo, ĉasputoro (*putorius furo*), bestoj utilaj en ĉasado ; ĉaskorno, ĉasdometo, kc.

ĉasta konforma, pense kaj fahre, al la kutimoj, reguloj kaj leĝoj moralaj = fraŭlino - ; amo - de fratino ; -aj edzoj.

ĉe prep. : montras diversajn rilatojn de apudeco | loko = li estas -mi ; venu -min ; sidi - tablo ; porti lanan veston - haŭto ; ĉeestis ducent aŭdantoj | tempo = ĉe tago, - l'vivo ; - tiuj paroloj, - l'unua rigardo ; trompi - la dividado.

ĉefi 1 esti ĉe l'unua rango ; superi aliajn pro graveco, aŭtoritato, povo, kc. = la sinĉereco devas - en ĉio | -a : plej grava, precipa = la -a danĝero estas la timo ; la -aj personoj de la urbo | kompone : ĉefangelo ; -pas-

tro, -episkopo ; -urbo ; -redaktoro, kc.

ĉeko speco de trato* banka | -strekita aŭ ĝirita : ĉeko kie la nomo de la persono je kies profito oni ĝirita, estas skribita sur la antaŭa flanko, inter du strekoj.

Vidu, sur sekvanta paĝo, modelojn de ĉeko simpla kaj ĉeko strekita ; tiu lasta... portas, ĉe dorso, la jenan ĝiron :

Paĝo laŭ ordono de S^r Mallet

Paĝo laŭ ordono de S^r Morel

Paĝo laŭ ordono de S^r Mallet

Paĝo laŭ ordono de S^r Morel

Paĝo laŭ ordono de S^r Mallet

Paĝo laŭ ordono de S^r Morel

Paĝo laŭ ordono de S^r Mallet

Paĝo laŭ ordono de S^r Morel

Modelo de ĉeko : FR. 1.000 La 15 de Marto 1906, KONTORO DISKONTA PARIZA FILIO EN LYON Paĝo laŭ ordono de S^r Mallet la sumon de mil frankoj. MARTIN et C^s LYON. Pageble al S^r Morel 142, St. Billot, Paris. S^r n^o 27.150.

Modelo de ĉeko strekita : FR. 1.000 La 15 de Marto 1906, KONTORO DISKONTA PARIZA FILIO EN LYON Paĝo laŭ ordono de S^r Mallet la sumon de mil frankoj. MARTIN et C^s LYON. Pageble al S^r Morel 142, St. Billot, Paris. S^r n^o 27.150.

ĉeno ligilo formata de ringoj metalaj kun kroĉitaj | -aro : ĉiu el tiuj ringoj | -bloko : rado kies rando estas dentumita tiel ke ĉiu dento respondas al ĉeno de speciala ĉeno.

ĉerizo frukto de -arbo (*cerasus vulgaris*).

ĉerko kesto de mortinto | -ajo : tombo, konstruaĵo difinita por enteni ĉerkojn.

ĉerpi 2 elpreni, eltiri = ĉerpi akvon el rivero, ideon el libro | -ilo : vazeto, sitelo por elpreni : - ilo de puto.

ĉesi 1 ne daŭri en sia ago aŭ stato = ĉesi paroli, -vivi ; se Dio ne estus justa, li -us esti bona | -igi : meti finon al = ĉesigi paroladon, vivon, eldonadon, kc.

ĉevalo mam. (*equus caballus*) | kompone : ĉevalino, -ido, -eto, -aĉo ; ĉevalisto, -ejo, kc.

ĉi montras apudecon = tie -, aŭ : - tie = en tiu loko apuda de ni ; tiu - aŭ : - tiu = tiu kiu estas proksime (loke aŭ tempe) ; tiel - : je tiu maniero, kiun oni ĵus priskribas ; - apude ; - entenate ; mi sendas al vi per - ; la ĉitleaj homoj ne estas socie-

maĵ.

ĉia adj. ĉiuspeca, kia ajn = malgraŭ ĉia ebla rimedo ; -floro havas propran odoron | -loke : en kia ajn loko - mi estas bone - | -okaze : kia ajn estas la okazo = mi ne scias, ĉu mi venos morgaŭ : - mi skribos al vi | v. ĉiu.

ĉial adv. pro ĉiu kaŭzo.

ĉiam adv. en ĉiu tempo, dum la tuta daŭro konsiderata | -a : senfina = li promesis al ŝi -an amon.

ĉie adv. ĉiuloke.

ĉiel adv. je ĉiu maniero | Rim. : akcentu bone ĉiel, por distingti de

ĉielo la spaco tuta = la - estas senlima | ŝajna kurbaĵo fiksa super niaj kapoj = stelo en nokta - ; la - estas nuba | teol. : feliĉejo ; -iro de Kristo, de Mario : festoj religiaj | -bluo : koloro de pura taga -.

ĉies de ĉiu, aŭ ĉiu = kies estas

tio ĉi ? nenies, aŭ se vi volas - ; - manoj kunligigas. ĉifi 2 malgladigi, ĉifonigi = bule - paperon ; - robon ; li ĉifis mian kolumon tiel bone gladitan.

ĉifono -aĵo : malnova peco de teksaĵo, ĉifajo | -ulo : vestita je -j | -isto : komercisto de -j.

mb. : ornamaĵo, galanteriaĵo ; oni trovas eĉ : ĉifonujo (t.e. kesto por ĉifonoj) en senco de : ŝranketo por galanterioj !

ĉikani ? akre riproĉi pro malgravajo = la pordistino -as kun la servistinoj pri ĉiuj faroj de la mastro.

ĉio ĉiu aĵo, la tuto = ĉio, kio havis komencon, havos finon | kompone : ĉiopova, ĉiovida, kc.

ĉirkaŭ prep. ; oni diras ke kelkaj punktoj estas - alia, kiam tiu lasta estas interne de la linio kiu ilin kunligas ; tiu prep. utilas :

1^o por montri eston aŭ agon okazatan ĉirkaŭ io = muro staras - la urbo ; la tero rondiras - la suno ; meti zonon - si | kompone : ĉirkaŭajo ; ĉirkaŭi, -kuŝi ; -ligi, -meti, -mordi, -preni, -rigardi (rig. ion je ĉiuj flankoj), -volvi, kc.

2^o por montri agon efikatan de io sur la objektoj apudaj ĉirkaŭ ĝi = li rigardis - si. fari ombron - si, semi la teruron - si | kompone : ĉirkaŭagi, -lumi, -ordoni, -rigardi, -spruci, kc.

Rim. - Kun la verboj 1 komponitaj per ĉirkaŭ, kiam la prepozicio uzota estas ĝuste -, oni uzas akuzativon sen prepozicio = fosajo -as la urbon ; la pastroj -saltis l'altaron

ĉiu adj. iu ajn el la konsideratoj, neniu esceptite = ĉiu homo estas mortonta | ĉiu-

loke - ajn loko | ĉiuokaze : laŭ - okazo : li rakontas -okaze strangajn aventurojn | kompone : ĉiujara, -monata, -semajna, -tago, -minuta, -momenta, kc.

ĉizi ? enranĉi per ĉizilo | -ilo : peco de ŝtalo kies fino estas akriegita laŭ linio kaj kiu utilas por enranĉi en ŝtofoj malmolaj : marmoro, metaloj, ligno = rekta, duonronda -ilo ; -ilo de meblisto, de skulptisto, de juvelisto, kc.

ĉokolado nutra komponaĵo de kakao kaj sukero.

ĉu adv. ; montras demandon.

Oni ordinare ne uzas ĉu kun rilataj pronomoj uzataj kiel demandaj, sed oni uzas ĝin en ĉiuj aliaj okazoj demandaj ; oni ĝin lokigas, se bezonas, antaŭ la vorto pri kiu estas aparte demandite ; ekz. : ĉu vi lin vidis ? - ne mi, sed aliu ; ĉu lin vi vidis ? - ne li, sed aliu ; ĉu vidis vi lin ? - mi ne lin vidis, sed oni tion diris al mi, kc.

D (do) konsonanto denta plaŭda-sona | D : nomo de tonoj kies nombro de vibroj estas 292 aŭ duobloj posekunde.

da prep. ; montras rilaton de kvanto.

Oni uzas da post vortoj havantaj sencen de kvanto :

1^o ĉu proprasence, kiel : kvanto*, multo, amaso*, aro, - iom, kiom multe, kelke, sufiĉe, tro, - deko, cento, milo, - nomoj de mezuroj : amplekso, longo, areo, vasto ; metro, gramo, litro, funto, kc. - daŭro*, k.a.

2^o ĉu okaze uzataj kiel mezurilo : glaso, plenmano, bobeno, pakajo, kc. En ĉiu okazo, laŭ tio se, en penso, la unua vorto celas determini kvante la duan, oni uzas post ĝi la prep da ; se male oni celas determini kvalite per la dua vorto la diritan kvanton, oni uzas la prep. de. Tial oni trovas samtempe : amaso da, aŭ de brutoj ; sumo da, aŭ de mono

Ekzemploj : mi petas de vi peceton da pano, donu al mi peceton de tiu ĉi kuko ; glason da vino li vendas 10 cmojn, glason de teo mi ŝatas post mango ; tio havas valoron da unu franko, la valoro de ŝilingo superas la valoron de franko ; duono da rublo, la duono de la sumo, duono de kokido ; ŝi utiligis por tiu laboro tri bobenojn da silko (silkon je kvanto da tri bobenoj), donu al mi la bobenon de silko, ne tiun de laŭo ; li vendis al mi tri pakajojn da tabako po 60 cmojn, li alportis al mi tri pakajojn de diverslandaj tabakoj.

Enfine oni ofte komprenas sendire vorton kvantan en diversaj esprimoj, kiel : manko (de sufiĉe) da spaco, premio (havante valoron) da 100 frankoj, (komparu) la premio de la konkurso), v. de.

dartilo frukto de -ujo (phoenix dactylifera).

dallo veg. (dahlia variabilis).

damo 1^o nomo de diversaj ludoj, v. ŝako, karto | ĉe damludo, soldato kiu sukcesis atingi la lastan linion kontraŭan | -ludo : ludo kiun oni kondukas per markoj (soldatoj) unuformaj kaj dukoloraj sur speciala tabulo (damtabulo) dividita je 64 aŭ 100 kvadratoj alterne blankaj kaj nigraj | 2^o damo aŭ damcervo : mam. (cervus dama).

danci 1 sin movi takte laŭ difinitaj reguloj, kun aŭ sen akompano de muziko = vals, polko, mazurko estas dancoj.

dandi 1 afekti apartan elegantecon je manieroj kaj vestaĵoj.

dangero risko, ebleco de ia malbono ; timindaĵo. danki 2 konfesi ricevon de bonfaro la kaj esprimi respondan senton al la bonfaranto = mi dankas al vi, aŭ vin pro tio ; danke ! ; sincera danko estas ŝatinda rekompenco ; mi sukcesis je tio dank'al vi, dank'al via helpo | komp : dank'al tiu okazo mi povis...

dato la nomo de l' monato kaj la numero de l' tago = kiun daton ni havas hodiaŭ ? - hodiaŭ estas la 23^a (tago) de aprilo ; oni festos baldaŭ la datrevenon de mia naskiĝo ; kambion oni pagas je datfalo ; ne forgesu datumi vian leteron.

Antaŭ dato oni povas uzi prep. en aŭ dum : tio okazis en la dua de decembro ; Vaŝington estis naskita dum la dudek dua de februaro 1732. Plejofte oni uzas akuzativon sen prepozicio : la duan de decembro, la 22^a de februaro. Enfine la nuna uzado tre ofte metas simple la numeron de la tago, tiun de la monato kaj la lastajn ciferojn de la jarnumero : 23/IV/05

daturu veg. (datura stramonium).

daŭri esti senhalte, seninterrompe = komenci, daŭri, ĉesi, estas la tri modoj de l'esto ; li daŭras paroli aŭ parolante ; lia malsano daŭris dum tri jaroj aŭ tri jarojn, (ĝi havas daŭron da tri jaroj) ; kiam li mortis, lia malsano daŭris jam de tri jaroj, (li estis malsana jam de tri jaroj) | -igi : estiĝi plue, ne ĉesigi = li daŭrigis mian laboron, tiu historio estas daŭrigota | -o : tempo mezurata : la daŭro de unu tago estas 24 horoj ; tiu laboro bezonas daŭron da tri tagoj ; ĝi havis daŭron da kelkaj sekundoj.

de prep. ; montras diversajn rilatojn :

1^o foriro : iri de Parizo al Londono ; de la kapo ĝis piedoj ; veni de Rusujo ; la vento de l' nordo ; rigardi de malproksime.

2^o simila senco rilate tempo ; fordaŭro = de nun (plue) ; de tiu tempo ; de eterne ; komencante de la tago kiam... ; en jaro mila de l' Enkarniĝo ;

lia malsano daŭras de tri jaroj.

En tiuj sencoj estas sama diferenco inter de kaj for. kiel inter ĝis kaj al. Efektive, for kaj al montras simplan movon inter la subjekto kaj la objekto = salti for la bordo, salti al la bordo : de kaj ĝis enhavas la tutan spacon aŭ tempon trairitan = de la kapo ĝis piedoj, de tiam ĝis hodiaŭ.

Kompare : tuto kies la konsiderato estas parto = la soldatoj de tiu regimento ; la sumo ; donu al mi peceton de tiu ĉi kuko - kauxo, aŭtoro, komplemento de verboj pasivaj = konsekvence de tio ; tio venas de la malbona edukado ; la sistemo de Kant ; amata de sia patro ; sin amigi de ĉiu ; naskiĝi de forta patrino ; la amo de Dio.

3^o de utilas por kunligi vorton kun ĝia determinanto, ne aldonante specialan sencen, tiel ke oni povas ofte meti anstataŭ ĝi simplan adjektivon kvalitan = la lumo de l' suno (la suna lumo) ; felo de urso (ursa felo) ; moroj de mezepoko (mezepokaj moroj) ; povo de kreanto (kreanta povo) ; aŭ kunmetitan vorton = aro de arboj (arbaro) ; amaso de steloj (stelamaso) ; de granda indio (grand-inda) ; regido de Danlando (danlanda regido).

4^o fine, de utilas por montri posedon, apartenon = la libro de Petro ; la filo de la najbaro.

En tiu lasta senco oni proponis uzi, anstataŭ de, dubiga kaj ofte maloportuna, italan prepozicion di Ekz : tiu kampo estas mia de la domo di S^o A. ĝis la lageto di S^o B. ; la tago de naskiĝo (naskiĝa tago) de la patrino di mia patro.

Kompone, de estas uzata nur en la unua senco = decen-trokura, defali, deflugi, deflui, deiri, deruli, deveni - deartikigi, defroti, degenerigi, debaki, dejeti, delogi, demeti, depreni, deteni, deteri, deturni.

v. da, el. for.

debato disputo (malofta). debeto ŝuldo de konto (komerco) = skribu la sumon en mian debetkonton.

debito vendado = tiu ĉi komercaĵo havas facilan debiton (malofta).

Neatendita malsaniĝo de l'Administranto de ESPERANTO devigas nin senkulpiĝi pri la malfrua apero de tiu numero, kaj ne permesas al ni promesi regulan eliraĵon de tiu-ĉi gazeto dum monato Decembro. Sed, ĉiuokaze dum Januaro ĝi eliros regule, kun sama aŭ alia Administranto. Se montrigas bezone.